



# Jarkolekto de TAKE 2006



Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj  
Wintzenheim — Francio



# Jarkolekto de TAKE 2006

Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj  
Wintzenheim — Francio

Eldonis: Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE),  
83 – Rue de Tiefenbach, 68920 Wintzenheim, Francio.

Redaktis kaj enpaĝigis: Fabien VAN MOOK (Rotterdam, Nederlando).

La fotoj sur la kovrilpaĝo estas prenitaĵoj de artikoloj el tiu ĉi jarkolekto.

# Enhavo

<b>Antaŭparolo</b> — Fabien VAN MOOK (NL)	<b>4</b>
<b>El historio de konstruaj materialoj</b> — Bronislav ĈUPIN (RU)	<b>6</b>
<b>Tegmenta kovrado</b> — Pierre GROlLEMUND (FR)	<b>12</b>
<b>Kelkaj pensoj pri la ŝtalbetono</b> — HALÁSZ József (HU)	<b>19</b>
<b>Rekonstruo de elementa lernejo Ivan Cankar en Ljutomer (Slovenio)</b> — ■orde OBRADOVIĆ (SI)	<b>49</b>
<b>Tra nova Pekino rigardu la tutan Ĉinion!</b> — SHEN Chengru (CN)	<b>64</b>
<b>La nova nederlanda normo pri venta ĝeno kaj venta danĝero por piedirantoj</b> — Fabien VAN MOOK (NL)	<b>73</b>
<b>Ĉarpentista interligado de lignoj</b> — Jan WERNER (CZ)	<b>85</b>

# Antaŭparolo

Tiu ĉi jarkolekto estas la dua kiun TAKE eldonas. Per jarkolektoj TAKE celas internacian interŝanĝon de profesiaj spertoj kaj ideoj kaj evoluigon de Esperanto en la profesio. Kompreneble temas pri la profesioj kaj fakoj de konstruado kaj arĥitekturo. Kvankam la temaro vastas, la enhavo de kontribuaĵoj estu altnivelaj kaj trafaj.

La unuan jarkolekton el 2005 redaktis Jan Werner. Por ĝi li vere sukcesis fiksi altan nivelon de artikoloj kaj prezenti fakan diversecon. TAKE fieras pri tiu unua eldonaĵo de nova serio. Mi esperas ke vi opinios la ĉi-jaran numeron same kvalita.

Ĉiu jara numero havu alian redaktanton. Mi akceptis la taskon en marto 2006. En anoncoj al eblaj aŭtoroj mi skribis: ■ Mi ne volas limigi la tem(ar)on de la jarkolekto 2006. La celo estas diverseco sed en serioza, konkreta, teknika kaj faka nivelo. Bonvenas artikoloj longaj kaj mallongaj, origine en Esperanto verkitaj kaj al Esperanto tradukitaj, superrigardaj kaj detaltraktaj, ktp. Imageblas ankaŭ artikoloj pri faka etiko, pri sociaj implikoj de/al konstruado, pri konstruista terminologio, pri naciaj au internaciaj konstrunormoj, pri detalaĵoj de konstruelementoj, pri la arĥitekturo de iu domo aŭ arĥitekto. ■

La artikolon pri ŝtalbetono de Jozefo Halász mi jam antaŭe ricevis de Jan Werner. Post miaj anoncoj venis artikolproponoj el kiuj realiĝis sep por ĉi jarkolekto. Por la venontjara numero jam ekzistas proponoj kaj eĉ kruda materialo. Mi mencias tiujn detalojn el la kulisoj de la redaktado ĉar el tiuj videblas laŭ mi entuziasmo kaj seriozeco inter aŭtoroj kaj ene de la estraro de TAKE pri la jarkolektoj.

Al la jarkolekto 2006 kontribuis entute sep aŭtoroj, el kiuj ne ĉiuj estas membro de TAKE. Vi leganto juĝu ĉu la enhavo kaj ties kvalito

de la 101 paĝoj respondas al la supre menciitaj celoj kaj al viaj atendoj. Mi limigas mian ĝojesprimon per tri punktoj.

Unue, la jarkolekto 2006 enhavas multajn bildojn, entute 55 figurojn. En niaj profesioj kaj fakoj ja preskaŭ ne eblas komuniki sen bildoj.

Due, en du artikoloj estas aplikataj terminoj laŭ la *Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj* de Jan Werner kaj kolektivo<sup>1</sup>. El ĝi aŭtoroj de la jarkolekto povis ĉerpi kaj feliĉe ili faris. Sed en aliaj subfakoj aŭtoroj spertis mankon de tiaj normigaj iloj. Feliĉe tio jam instigis niajn aŭtorojn kaj fakulojn plu labori pri terminoj el iliaj fakoj kaj rezultojn oni espereble prezentos en venonta jarkolekto de TAKE.

Trie kaj fine la redaktado de la jarkolekto 2006 sufiĉe rapidis kaj glatis. Pro iliaj kontribuoj kaj pro agrabla kunlaboro kun ili mi ĉi tie solemne kaj sincere dankas al la aŭtoroj.

Je novembro 2006,  
Fabien VAN MOOK

---

<sup>1</sup>La kolektivo konsistis el Willi Brandenburg (DE), Fabien van Mook (NL), ■orde Obradović (SI) kaj Josef Trojan (CZ). Eldono el majo 2002, ĉe Jan Werner en Brno (CZ) kaj ĉe la retejo <http://purl.org/net/take-tk/tv/betono.d.html>.